

LECIONO 16

Gramatiko



– **ing** – суффикс, обозначающий предмет, в который частично помещён и зафиксирован другой предмет: kandelo (свеча) – kandel**ing**o (подсвечник). Tubeto, en kiun oni metas cigaredon, kiam oni ĝin fumigas, estas cigared**ing**o. Трубочка, в которую кладут сигарету, когда её курят, является мундштуком.

mis – приставка обозначающая, что действие производится ошибочно или неверно: kalkuli (считать) – **miskalkuli** (обсчитаться). Ĉu mi ne **misaŭdis**: via antaŭnomo estas Vladimir? Я не ослышался: ваше имя Владимир?

Taskoj



I. Antaŭ ol legi la tekston «La eventoj en arbaro» difinu signifon de jenaj vortoj: salono, soldato, atako, cigaredo, deĵori, detala, funkcii, karto, raportoj, regiono, stari.

La eventoj en arbaro

La esploristoj, senditaj kun Klajd, facile trovis la lokon. Reveninte, ili raportis al kolonelo, ke la ŝtelistoj preparas ĉion por nokta forflugo. La kolonelo formetis cigaredingon kaj diris al Maksim:

– Ni devas rapidi, profesoro. Miaj soldatoj estas spertaj batalantoj. Mi mem gvidos ilin. Do, ni povas komenci la atakon.

– Tamen, estas la kaŭzo por prokrastigi la atakon, – respondis Maksim. – Inter ili estas la mamutido. Ni ankoraŭ unu fojon ĝustigu ĉion, precipe tion, kio rilatas Miĉjon. Ni ne rajtas misagi.

Ili denove klinis sin al la detala mapo de la regiono.

... Krim sentis sin feliĉa, kvazaŭ li jam gajnis la milionon. La besto apartenis al li. Ĝi estis en la kavo kaj ĝi estis ligita per rimenoj al la helikoptero. Tiu staris super la kavo kaj estis preta por ekflugo. La helpantoj de Krim, armitaj per senbrujaj pistoloj kaj akraj tranĉiloj, deĵoris en la arbustaro. Mem Krim kun la kato Graf kaj kun la pistolo decidis ripozi en salono de la helikoptero.



mapo

– Gardu la lokon atente! – ordonis li al la helpantoj. – Post unu horo ni startos...

Ĉio ŝajnis trankvila, kvankam la kato miaŭis malkontente:

– Tiu hundaĉo kaŝas sin ie en proksimo. Miaŭ! La vosto doloras!

Finfine ankaŭ ĝi trankviliĝis apud la dormanta Krim. Pasis iom da tempo kaj subite iu laŭte vokis:

– Hej vi, en la helikoptero! Levu la manojn kaj eliru!

– Startu ni! – jelpis Krim al la piloto. – Ili ne pafos kontraŭ la besto!

La motoro ekfunkciis, ekbruis, sed la helikoptero restis sur la sama loko. Ĝi estis firme ligita per feraj ŝnuroj al kvar arboj.

– Ne malhelpu! – jelpis Krim, svingante per la brako. – Aliokaze mi mortigos la bestaĉon!

– Eliru, eliru, sinjoro Krim, – pace ridetis la kolonelo, – Miĉjo ne plu estas tie.

Krim ĵetis rigardon en la kavon – tie kuŝis la gardistoj kun ŝnuritaj brakoj kaj kruroj. Tiam li malrapide levis la manojn.



II. Traleginte «La eventoj en arbaro» respondu al la demandoj.

Kion kaj al kiu raportis la esploristoj senditaj kun Klajd? Kio kaŭzis la prokrastigon de la atako? Kial Krim sentis sin feliĉa? Per kio estis armitaj la helpantoj de Krim? Kial la kato Graf miaŭis malkontente? Pro kio la helikoptero ne povis ekflugi? Kiu kuŝis en la kavo anstataŭ la mamutido?

III. Trovu en la teksto la frazojn, kiuj atestas pri kuraĝa karaktero de la kolonelo.

IV. Resumu la enhavon de la teksto laŭ jenaj helpvortoj:

esplorintoj – stelistoj – nokta forflugo,

kolonelo – soldatoj – atako,

besto – kavo – rimenoj,

helpantoj – pistoloj – tranĉiloj,

prokrastigi – ĝustigi – misagi,

Krim – Graf – salono de helikoptero,

levu – eliru – startu ni,

motoro – sama loko – kvar arboj,

gardistoj – brakoj kaj kruroj – manoj.

V. Helpe de la sufikso – ing –

1) faru novajn vortojn kaj traduku ilin: cigaredo, glavo, fingro, ingo, kandelo;

2) enmetu la novfaritajn vortojn en sekvajn frazojn:

Antaŭ ol kudri mia avino ĉiam surmetas sian ...n. Ĉe la muro staris malnova piano kun orumitaj ...j. Unu el ornamaĵoj de tiu ĉi domo estis trofea glavo en Depende de speco de cigaredoj ŝia frato uzis diversajn ...jn: el ligno, sukceso, ostoj. Por ke okulvitroj servu longe necesas meti ilin en ...n.

VI. Helpe de la prefikso mis –

1) faru novajn vortojn kaj traduku ilin: aŭdi, informi, kalkuli, kompreni, konduki, rigardi;

2) enmetu la novfaritajn vortojn en sekvajn frazojn:

Radio ...is pri hodiaŭa vetero: pluvas de mateno. Mi ...is vian nomon, bonvolu ripeti ĝin. Aŭskultu atente la anoncon, por ne ...i. La eta vojo en arbaro ...is infanojn kaj ili perdiĝis. La lernanto estas laca. Li ofte ...as. Tiu pasaĝero ...is horaron kaj maltrafis trajnon.

VII. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:

завязать пакет, завязать глаза, завязать ботинки, завязать узлом, завязать галстук, завязать разговор, завязать торговые отношения, завязать перестрелку, завязать ссору, завязать переписку, завязать интригу.



VIII. Tralegu fragmenton el la libro «Nesto de viperoj» de hungara aŭtoro István Nemere kaj diru, kion serĉis policistoj.

Nesto de viperoj

La eksterordinara grupo polica nur je la unua posttagmeze finis la laboron. Dekduo de uniformitaj kaj civilaj policistoj traserĉis la ĝardenon. Samtempe Lina, Koller kaj aliuloj denove esploris la tutan domon. Ĉiun ĉambron, ĉiun ejon komunan. Ankaŭ la banĉambrojn ... Ili disĵetadis la aĵojn de la domanoj, de gastoj kaj de servistoj, rigardis en la skribotablojn, ŝrankojn, eĉ en valizojn kaj litojn. La domanoj estis jam post la tagmanĝo, kiun Mathilde kaj Betty en tre angora atmosfero servis al

la tablo. La policistoj ricevis tagmanĝon el la urbo; oni liveris ĝin aŭte rekte el la policeja kuirejo. La maljuna ĉefo de Koller kompreneble eluzis la okazon kaj denove telefonis al la inspektoro. La dua murdo – apenaŭ sep horojn post la unua, samloke, en ĉeesto de la polico! – finfine ankaŭ lin nervozigis...

. Eble la ĉefo jam vidis: tiu ĉi murdisto estas pli ruza ol kiu ajn el la lastjare renkontitaj. Tia afero ankoraŭ neniam okazis. La krimfarinto kontinuis sian «laboron» eĉ tiam, kiam sur liaj spuroj iris jam du detektivoj! Do tiu ulo certe estis decidinta je ĉio! – rekonis eĉ laŭte la ĉefo; feliĉe li ne permesis eldoni komunikon al la gazetaro kaj televido. Anstataŭ tio li promesis al la «hienoj», ke eble post du-tri horoj li respondos al iliaj demandoj. Tiamaniere li certigis iom da tempo por trankvila laboro de la kolegoj...



valizoj



1. Respondu al la demandoj.

Kiom da policistoj traserĉis la ĝardenon? Kiu esploris la tutan domon? Kiujn ĉambrojn? Kio okazis al la aĵoj de la domanoj, de la gastoj kaj de servistoj? En kia atmosfero oni servis al la tablo por la tagmanĝo? De kie estis liverita la tagmanĝo por la policistoj? Kial la maljuna ĉefo telefonis al la inspektoro? En kies ĉeesto okazis la dua murdo? En kiuj cirkonstancoj «laboris» la krimfarinto? Kion malpermesis la ĉefo? Je kio pretis la ĉefo post du-tri horoj? Por kio li bezonis tiun tempon?

2. Elektu la titolon por la legita fragmento aŭ elpensu iun alian.

Senhonta «laboro» de la krimfarinto. Ruza murdisto. Angora kaj nervoziga atmosfero en la domo.

3. Komparu scenon de serĉado en la rakonto de M.Bronŝtejn kaj en la fragmento de I.Nemere laŭ la skemo: loko – objekto de serĉado – celo de serĉado – rezulto.

IX. Tralegu la versaĵon de pola aŭtoro Julian Tuwin en traduko de J.Handzlik.

- 1. Voĉlegu la tekston de la versaĵo kaj traduku ĝin helpe de vortaro.*
- 2. Trovu en la versaĵo la kunmetitajn vortojn kaj klarigu ilian formigon.*
- 3. Parkerigu la versaĵon.*

Okulvitroj

Okulvitrojn el la oro
Perdis ie grandsinjoro.
Tuŝas ambaŭ poŝotruojn,
Dekstran kaj maldekstan ŝuojn.

Eĉ malfermis la ombrelon,
Eĉ rigardis sub ĉapelon.
Laŭte krias je ĉielo:
«Certe jam okazis ŝtelo!»



ombrello

Ĉie serĉis: sub divano,
En muŝtruo, en piano.
Eĉ rigardis kamentruon,
Ĉar pri tio havis dubon,

Eĉ sciigis pri la manko
Policejon; ŝiris plankon.
Kaj subite, nervozulo
Ekrigardis la spegulon.

Kaj klariĝis turmentkazo:
Ili estis sur la nazo.

Ŝlosiloj al la taskoj

Tasko V

2) Antaŭ ol kudri mia avino ĉiam surmetas sian fingrington. Ĉe la muro staris malnova piano kun orumitaj kandelingoj. Unu el ornamaĵoj de tiu ĉi domo estis trofea glavo en glavingo. Depende de speco de cigaredoj ŝia frato uzis diversajn cigaredingojn: el ligno, sukceso, ostoj. Por ke okulvitroj servu longe necesas meti ilin en ingon.

Tasko VI

2) Radio misinformis pri hodiaŭa vetero: pluvas de mateno. Mi misaŭdis vian nomon, bonvolu ripeti ĝin. Aŭskultu atente la anoncon, por ne miskompreni. La eta vojo en arbaro miskondukis infanojn kaj ili perdiĝis. La lernanto estas laca. Li ofte miskalkulas. Tiu pasaĝero misrigardis horaron kaj maltrafis trajnon.

Tasko VII

завязать пакет – ligi pakaĵon, завязать глаза – vindi la okulojn, завязать ботинки – ŝnuri botetojn, завязать узлом – nodi (nodligi), завязать галстук – nodi kravaton, завязать разговор – lanĉi konversacion, завязать торговые отношения – lanĉi komercajn (inter)rilatojn, завязать перестрелку komenci interpafadon, завязать ссору – ekmalpacigi, завязать переписку – ligi korespondadon (ekkorespondi), завязать интригу – ligi (komenci) intrigon